SUMMER ESPERANTO INSTITUTE
37 Consecutive Years
School for International Training

JARRAPORTO PRI LA 37A NORD-AMERIKA SOMERA KURSARO DE ESPERANTO (NASK) 2006

La 37a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazis la kvinan fojon ĉe la orienta flanko de Usono ĉe la fama Altlernejo de Internacia Trejnado (School for International Training) apud la belega urbeto Brattleboro, Vermonto. Inter 3-21 julio, dudek tri studentoj studis pere de la helpo de tri instruistoj: Katalin Kovats (Hungario/Nederlando), Sylvain Lelarge (Francio/Nederlando) kaj Lee Miller (Usono). La partoprenantoj venis de Belgio, Kanado, Kroatio, Nepalo, Japanio kaj Usono (Georgio, Kalifornio, Kolorado, Majno, Masaĉuseco, Misurio, Nevado, Novjorko, Nova Meksikio, Pensilvanio, Vaŝingtonio, Viskonsino), do la etoso estis vere internacia.

NASK 2006 ofertis tri kursnivelojn de postkomencanta ĝis altnivela. Ĉiu kurso donis 3 studunuojn. Lee Miller, kiel administranta instruisto, gvidis la postkomencantajn studentojn kaj faris la administrantajn taskojn. Katalin Kovats provizis unikan lingvasperton por la altnivelan grupon surbaze de la vivo kaj arto de la pentristo Vincent van Gogh. Sylvain Lelarge uzis sugestopedion kaj aliajn cerbamikajn paroligajn aktivojn kun la progesintoj. Ofte, la du lastaj kursanoj kunlaboris. Derek Roff filmis kelkajn el tiuj sesioj por la ESF projekto "Katedro." Liland "Haruo" Ross faris du taskojn: aranĝon de la eksterklasaj aktivoj kaj redaktadon de la tagĵurnalo, *Naska Fasko.* En ĝin Haruo enmetis ne nur gravajn informojn pri la kursaro sed ankaŭ verkaĵojn de la studentoj mem. Antaŭa redaktoro Tim Westover kreis retpaĝaron por la kursaro ĉe: http://www.literaturo.net/naskafasko/2006/.

Dek kvin el la kursanoj ricevis subvencion de la NASK-Studenta Fonduso de ELNA aŭ la Fonduso "Schulze Education Endowment" de la Esperantic Studies Foundation. La "Schulze Education Endowment" estas kreita pere de la heredaĵo de Bill kaj Cathy Schulze por certigi la daŭron de la someraj kursaroj. ESF ankaŭ subvenciis la kromajn kostojn ne kovritajn per la kurskotizoj.

The Universitato de Kalifornio, San Diego invitis nin starigi la kursaron tie en 2007. La datoj estas 9-28 julio.

Ellen M. Eddy

Ellen M. Eddy